LA LANTERNISTO

Venas Majsi
ĉe l'krepusko
de la tago agonia,
kaj sub fenestreto mia
li per ŝtupetar' lumigas
la lanternon,
dolĉigante noktkonsternon.

Ĉiutage
Malpliiĝas korposano,
sed karula Poezio,
mia noktkompaniano,
grimpas mian ŝtupetaron
ĉe la koro
por lumigi lanterneton:
la mildigo de l'malĝojo
ĝis la fin' de l'vivovojo.

Ve, se, por lumigi straton
mian, Majsi ne venadas;
kaj ve, se la Poezio
mian koron ne invadas!

Maqluba għall-Esperanto minn
KARMENU MALLIA

21.iv.65

N.B. Din it-traduzzjoni ħadet it-tieni premju fil-Konkors ta' traduzzjonijiet għall-Esperanto, imniedi fl-1966 mill-'Universala Esperanto-Asocio'.

LA BOVO

Ligita, katenita,
La bovo penrespiris:
Luktante kaj lacege
Li fine enen iris.
Kaj ekflarinte korte la odoron:
Evidentiĝo de l'verŝado sanga,
La bovo ekteruris la buĉejon
Per sia bleko stranga.
Kaj, kiam la ĉirkaŭo postsilentis,
La bovo ekdormiĝis
Ĉar laca li sin sentis.
Li revis pri vasta kampar' verdeca,
Kie brutar' paŝtiĝas ĉiuspeca,
Kaj tutkontenta sub la suno krea
Hufpremis sakojn da furaĝ' ĉiea;
Ĝis kiam el la dorma ripozemo
Lin vekis de l'buĉisto piedpremo.
Kaj, kiam bruis per babil' la korto,
La bovo tuj eksciis,
Ke lin apudis de la mort' la sorto.
Tiom malgajan kaptis lin ektimo,
Kiom sklava de l'sort' iĝas animo.
Tiam, sentinte en la korpon iri
La sangigantan buĉilegon, tial
Li mildrigardis mortiganton sian
Kvazaŭ por demandeti: 'Kial, Kial?'

20.iv.65

Maqluba għall-Esperanto min
KARMENU MALLIA

N.B. Din it-traduzzjoni ħadet it-tielet premju fil-Konkors ta' traduzzjonijiet għall-Esperanto, imniedi fl-1966 mill-'Universala Esperanto-Asocio'.